

Printempaj orkidoj



ESPERANTO-GIRONDE
KUNVENO en Maison de quartier de Cap de Bos,
39 rue des Provinces, PESSAC
la 11an de januaro 2025
de la 10a 30 ĝis la 16a

Ĉeestas: Ĵanseb Brilleaud, Elvezio Canonica, Janine kaj Yannick Dumoulin, Gloria Gargallo, Hervé Giranton, Katya Gradzion, Olivier Moreno, Seán Ó Riain, Klodin' Pomiról, Marcelo Redoulez, Bernardo, Maeva kaj Rose-Sarlandie, Jean-François Seylier, Eric Tiffon.

Senkulpigitaj: Joël Lajus, Dominiko

Elvezio bonvenigas al ĉiuj.

Marcelo salutas por Joël .

Klodin' informas, ke Monique invitas nin por la bela sezono.

Elvezio: Forpasis Fernando. Kelkaj el ni ĉeestis la ceremonion kaj kondolecis al Anna Maria, lia edzino. **Marcelo** verkis artikolon por LEGI kaj invitas ĉiujn verki pri Fernando¹.

Klodin': Ni atendas reagojn ankaŭ pri la koncerto de Christian Leduc.

Yannick raportas pri la financoj:

Espéranto-Gironde havas 6135,19 €, el kiuj 2510,54 € sur la ĉeko-konto kaj 3578,75 € sur la ŝpar-konto, + 45,90 € (sociaj akcioj).

Pri la koncerto:

Elsp: 475 € (SACEM, luado de la salono, pago de Christian Leduc)

Ensp: +/- 315 €

Deficito sufiĉe malgranda: +/- 160 €

Marcelo: La malprofito estas minimuma. La tuta publiko estis favora al la etoso, kiu ŝvebis en la salono.

Je la alveno de **Seán, Jean-Seb** prezentas la manieron fari kurson surbaze de la Eŭropa himno poste ĉiu sin prezentas.

Marcelo resumas por Seán el kio konsistis la koncerto.

Marcelo: La lasta versio de la Brassens-libro estis validigita por sendi al la presisto.



¹. Vd en nro 177, p.33 kaj en ĉi-numero pp.24, 25, 26).

Marcelo klarigas pri la filmo *Ne timigas nin ruinoj*: La reĝisoro Yannis Yolountas, grekdevenulo el Tuluzo, subtenas asociojn, kiuj defias la ŝtaton, subtenantajn migrantojn en okupitejoj. Li filmis la loĝantojn kaj la asociojn. Li deziras, ke ekzistu versioj en multaj lingvoj. La Esperanta versio estas preskaŭ preta: ĉiuj frazoj estas fintradukitaj kaj nun oni devas harmoniigi la tuton. Hodiaŭ posttagmeze la reĝisoro prezentas la filmon en Bègles, kadre de granda turneo en Francio kaj aliaj landoj.

De Tuluzo, ili karavane veturas al Grekio, por alporti necesajn varojn.

Bernardo estis kontaktita de ĵurnalistino je RIG Radio Iguanodon, loka radio en Blanquefort, por paroli pri Esperanto, ties kulturo, historio ktp.



Elvezio: La lingvo-festo okazos la 3an de aprilo en la universitato. Esperanto rajtos esti prezentita. La festo okazos ĉefe dum la paŭzo inter la kursoj.

La venontaj kunvenoj okazos la **16an de februaro kaj la 23an de marto (Ĝenerala Asembleo kaj Printempo de l' poetoj)**

Posttagmeze, Marcelo prezentas bildaron pri *Libera la Pens'* (vd nLEGI 177).

Raportis Janine



NIAJ KURSOJ

- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono G-207, ĉiun merkredon de la 17a30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio helpe de Jean-Seb. (06 72 17 22 97)

- En **SAINT-GENÈS DE LOUBÈS**, nun la kursoj okazas laŭ nedifinita horaro, ĉar ni estas tre malmultaj, kaj inter ni estas infanoj. La sekva kurso okazos sabaton la 23-an de marto je la 10a15, ĉe Jean-François kaj Iberla, kun Klodin' kaj Marcelo. Se estos aliaj homoj, ni disponos pri komunuma ĉambro.

Por informiĝi: gemesperanto@gmail.com aŭ 06 60 18 28 66.

ESPERANTO-GIRONDE

KUNVENO en Maison de quartier Pessac Bourg en PESSAC la 16an de februaro 2025 de la 10a 30 ĝis la 16a



eestas: Ĵanseb kaj Annie Brilleaud, Elvezio Canonica, Janine kaj Yannick Du-moulin, Jean-Loup Firmery, Hervé Giranton, Katya Gradzion, Joël Lajus, Lucienne Laroche, Dominiko, Olivier Moreno, Seán Ó Riain, Klodin' Pomirol, Marcelo Redoulez, Bernardo kaj Rose-Sarlandie, Jean-François Seylier, Eric Tiffon.

Senkulpigita: Gloria Gargallo

Elvezio bonvenigas al ĉiuj.

Yannick transdonas saluton de Martine.

Elvezio: Estas du novaj studentoj en la kurso: juna studento venis unufoje , Tom kaj Francis (juna emerito), kiuj venis dufoje.

Ĉiuj bonvenigas al Jean-Loup, kiu eklernis Esperanton antaŭ 10 jaroj. Li estas instruisto en Galgono.

Dominiko: Koruso *Yaka chanter* deziras kanti kantojn en Esperanto.

Yannick konsilas vidi la retejon de La Kompanoj.

Pri Brassens:

Ni ricevis la oficialan version de la libro. La kosto de la presado estas malpli alta ol la antaŭa. Ni ricevis 92 ekzemplerojn el kiuj 3 estis difektitaj.

Kosto de la tuto:

- Universal: 264 € por 100 ekz (en nov. 2022)
- Warner: 250,80 € por 200 ekz (en dec. 2023)
- Flammarion (por du tekstoj de Paul Fort): 55 € por 200 ekz. (en apr. 2024)
- ISBN: 28 € (pagita de Martine mem per Bankokarto)
- Presado: 438,74 € por +/- 100 ekz

Sume: 1018,54 €

Per la vendo de 57 ekzempleroj po 18 €, ni kompensas la kostojn.

La kosto de ĉiu libro estas 11,80 €.

Libroservoj postulas 30%-rabaton.

Ni povos sendi al ili.

La laste ricevataj libroj estas malpli pezaj ol la antaŭaj, do la sendokosto estos pli malalta.



Marcelo: Dankon al Yannick, kiu persiste laboris pri la afero kaj atingis sukceson. Ni sendu al Blaise, la desegnisto, 3 librojn.

Dominiko: Ni povas ilin reteje vendi.

Yannick: Aĉetontoj povos pagi per Hello Asso aŭ per ĝiro.

Elvezio: Por reklami pri la libro, estas grupoj da Brassens-ŝatantoj.

Yannick: Giganta retejo pri Brassens estas aupieddesonarbre.com. Nia libro interesas la zorganton de la retejo; la novaĵletero estas sendita al pli ol 1000 abonantoj. Jen la dua parto de nia projekto: konatigi Esperanton al Brassens-ŝatantoj.

Elvezio: Oni sendu ekzempleron ankaŭ al la Brassens-Muzeo en Sète, kaj nia biblioteko aĉetos unu.

Yannick: Oni povas sendi kelkajn ekzemplerojn al *Espéranto-France* kaj SAT-Amikaro.

Marcelo: Ili prenas 3 kaj pagas 2.

Yannick: Oni povas reklami ankaŭ sur la retejo de La Kompanoj kaj sur tiu de *Espéranto-Gironde*.

Elvezio: Kaj ankaŭ ĉe lokaj grupoj, ĉe la Nacia Muzeo en Gray...



Elvezio: Venontan ĵaŭdon okazos evento kun asocio La Pangée en Halle D12 (apud la Capucins-bazaro): *La poésie des langues, héritage en mouvement*. La evento estas organizita kun la urbodomo. Okazos 10-minuta prezento de Esperanto.

Marcelo, Klodin' kaj Katya ĉeestis, kaj ankaŭ Hervé. Marcelo disdonos flugfoliojn por prezenti Esperanton. Estu aldonita la kontakto de *Espéranto-Gironde* sur la folio.

Dominiko intencas prezenti en julio filmon *La genèse de l'Espéranto* en la Grajneto. Ses homoj ĉeestis en la kunveno pri liberaj monoĵoj, programoj ktp.

Pri Ne timigas nin ruinoj:

Marcelo: En decembro ĉeestis je la projekciado de la filmo *Nous n'avons pas peur des ruines*.

Kontaktis ĉirkaŭ 50 homojn por la traduko de la subtitoloj. La reĝisoro tre ŝatis, ke ekzistas Esperanto-versio. Marcelo decidis krei la neologismon « skvato », kun derivaĵoj: skvati, skvatejo ktp.

La tekstoj de la traduko estis senditaj al eksterlandaj Esperantistoj por kontrolo. La teknikisto enigis la Esperantajn subtitolojn en la filmon.

Yannis promesis grandan surprizon.

La Hispana Kongreso de Esperanto okazos en majo en Sorio: la filmo estos prezentita.

Marcelo prezentos ankaŭ la bildaron pri Aristides ĉi-okaze.

Yannick: Ĝis nun ricevis 18 kotizojn.

Elvezio: La 3an de aprilo okazos la Lingvo-Festo en la Universitato.

Klodin': Ni renkontis Bruno kaj Maryvonne Robineau, aĉetis de ili du librojn, kiujn ni povas donaci al la biblioteko de la universitato aŭ tiu de Espéranto-Gironde.

Marcelo prenas 3 Brassens-librojn por sendi al Blaise, kaj 5 por vendi.

Elvezio prenas unu por la Universitato.

Bernardo informas pri la Mondcivitanoj. Li mem aliĝis antaŭ 50 jaroj. Daniel Durand eldonas bultenon en Esperanto. (Vidu ĉe recim.org kaj tuj registru!)

La venonta kunveno temos pri la ĝenerala asembleo kaj pri la Printempo de l'Poeto j (23an de marto).

La kunveno finĝas ja la 12a 50.

Posttagmeze, **Katya** prezentas tre amuzan bildaron pri la preferoj de la Francoj rilate al fromaĝoj. (Vd p.14)

Sekve **Marcelo** kantigas nin la kanzonon *Fromaĝ' el Edamo* (vortoj de Georges Lagrange) kaj invitas nin omaĝi al Renato Corsetti per du kantoj, kiun li tradukis: *Belulin' ĝis* (*Bella ciao*) kaj *L'estaca* (de Luis LLach).

Poste li pensigas nin pri la uzo de « ci » kaj « vi » en Esperanto, laŭ la influo de la naciaj lingvoj (publikigota en venonta LEGI).



Raportis Janine

ESPERANTO-GIRONDE
ASSEMBLEE GENERALE
Maison de quartier Pessac Bourg à PESSAC
le 23 mars 2025 à 10h30

Présents ou représentés : Jean-Seb Brilleaud, Elvezio Canonica, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Monique Dussenty (pouvoir à Janine Dumoulin), Hervé Giranton, Katya Gradzion, Lucienne Laroche, Dominiko, Olivier Moreno, Seán Ó Riain, Claudine Pomirol, Marcel Redoulez, Bernard Sarlandie (pouvoir à Elvezio Canonica), Rose Sarlandie (pouvoir à Yannick Dumoulin), Eric Tiffon.

Excusés : Gloria Gargallo, Joël Lajus, Bernard Sarlandie, Rose Sarlandie, Jean-François Seylier,

1. Rapport d'activité

Année 2024 :

- LEGLI : sont parus 3 numéros : 174 à 176.
- Réunions : Il y a eu 7 réunions :
 - 21 janvier à la Maison de quartier Pessac Bourg
 - 10 mars à la Maison de quartier Pessac Bourg
 - 7 avril à la Maison de quartier Pessac Bourg (AG)
 - 9 juin à la Maison de quartier Pessac Bourg
 - 15 septembre à la Maison de quartier Pessac Bourg
 - 13 octobre à la Maison de quartier Pessac Bourg
 - 10 novembre à la Maison de quartier Pessac Bourg
 - 8 décembre : Zamenhof-Tago à la salle de France à Pessac
- Nous avons déploré la disparition de notre ami Fernando Torres le 29 décembre.
- Activités et événements :
 - Les cours ont continué au GEME à Saint-Genès-de-Lombaud.
 - Eric a mis en place une bibliothèque d'Espéranto-Gironde à gestion informatisée.
 - Poursuite des cours d'espéranto à l'université, avec deux nouveaux étudiants.



- Le projet de traduction en espéranto des sous-titres du documentaire *Nous n'avons pas peur des ruines* a été mené à son terme.
- Marcelo a participé à la rencontre mensuelle organisée par Sandor Horvath, et a présenté son diaporama sur Brassens en espéranto.
- Marcelo, Claudine, Katya, ainsi que Bernard et Rose ont participé au Congrès Européen à Strasbourg en mai.
- Marcelo, Claudine et Katya, ainsi que Monique, ont assisté à l'inauguration de la place Lucien Péraire à Lavardac le 8 juin..
- Marcelo, Claudine et Katya ont participé au congrès de SAT à Porto en août. Marcel et Claudine y ont présenté leur exposé sur Aristides de Sousa Mendes. Marcel avec la coréenne Haesim Park a présenté le diaporama "Comment un tube français est devenu une chanson révolutionnaire en Corée du Sud".
- Plusieurs membres ont participé au forum des associations à Pessac le 7 septembre.
- Marcel, Claudine, Katya, Dominiko et Geneviève ont participé à la rencontre en Pays Basque à Arizu en novembre.
- Marcel, Klodin' et Katya ont participé au congrès virtuel d'UEA en novembre.
- Espéranto-Gironde a organisé le concert de Christian Leduc à la Salle de France le 8 décembre.
- Le projet Brassens est arrivé à son terme ; les exemplaires « officiels » ont été commandés à l'impression en décembre et livrés en janvier 2025.
- Le site internet est tenu par Eric et Domingos.
- Infolettre mensuelle d'Espéranto-Gironde par Domingos
- Rendez-vous mensuels, le 4ème jeudi du mois, au café associatif Le Petit grain.



Le rapport d'activité est approuvé à l'unanimité

2. Rapport financier

En 2024, deux comptes ont fonctionné parallèlement pendant environ trois mois (de janvier à mars).

BILAN FINANCIER 2024

RECETTES

Cotisations	445 €
Concert C. Leduc	311,30 €
Ventes diverses	236,29 €

Revente de parts sociales (Crédit Agricole Gironde)	30 €
Intérêts livret A	78,75 €
Don	5 €

Total 1106,34 €

DEPENSES

Droits Flammarion	55 €
Assurance	117,05 €
Concert C. Leduc	475,29 €
Achat gâteaux rois	17,80 €
Achat tampon	27,15 €
Achat flyers	45,92 €
Frais postaux	59,63 €
Dons à EF	60 €
OVH (nom de domaine)	9,35 €
Achat de parts sociales (Crédit Agricole Charente Maritime)	45,90 €

Total 913,09 €

Solde positif 193,25 €

Avoir total 31/12/2023 (ancien compte) 6070,16 €

Avoir total 31/12/2024 (nouveau compte) 6263,41 €

(CC 2638,76 € + livret A 3578,75 + parts sociales 45,90 €)

Il reste environ 90 timbres verts utilisables pour les envois de LEGI.

A noter que les livres écrits en français ne bénéficieront plus d'un tarif spécial pour l'envoi à l'étranger à partir de juillet.

Le rapport financier est approuvé à l'unanimité

3. Projets

- LEGI

Un numéro est paru en janvier (177)

- Réunions :

Deux réunions ont eu lieu :

- 11 janvier à Pessac
- 16 février à Pessac

- Rencontre au Pays basque en mai

• Marcel : Projet pour le prochain Zamenhof-Tago : inviter Jomo et sa complice la conteuse Vjera. Nous avons hébergé Vjera (Véronique Girard), qui avait présenté un spectacle avec Jomo quelques jours auparavant. Elle est conteuse professionnelle. Elle viendrait volontiers et a envoyé les disponibilités de Jomo à cette période. Il serait libre le 14 décembre.

Coût : 300 € pour un ou 500 € pour les deux + frais de transport. Il faut répondre assez vite.

Peut-être dans la salle de France à Pessac ? (location : 250 €)

On pourrait peut-être organiser l'événement avec La Pangée, le Petit Grain, ce qui permettrait d'avoir une salle gratuite à Bordeaux.

Le problème est de faire venir du public : au concert de Christian Leduc, ce sont surtout des membres de l'association de la salle de France qui sont venus.

L'association du Petit Grain compte de très nombreux membres, mais le Petit Grain ne fonctionne pas le dimanche.

L'association La Pangée, qui s'occupe de multilinguisme, connaît Jomo.

Véronique raconte en français mais peut chanter en espéranto.

-> Projet approuvé

- Hispana Esperanto Kongreso, début mai. Marcel et Claudine y assisteront.

Un petit livre est prêt à paraître : il contient 30 histoires courtes... sur la Guerre d'Espagne, mais pas uniquement. Nous pourrions en choisir chacun une que nous lirons et que chacun présentera simplement en quelques mots lors de la prochaine réunion. Nous pourrions aussi commander le livre (10 €).

- Réfléchir à ce que nous ferons pour le 1^{er} mai.

- Dominiko demande ce que l'on pourrait faire de plus pour faire connaître l'espéranto. Pas de réponse : on fait déjà beaucoup...

- Forum des associations : 6 septembre

- La Fête des Langues : l'université étant bloquée en ce moment, il est difficile de savoir si l'événement pourra avoir lieu.

Prochaines réunions :

13 avril

11 mai

15 juin

4. Renouvellement du tiers sortant

Le conseil d'administration se compose de Jean-Sébastien Brilleaud, Luca Buselli, Elvezio Canonica, Yannick Dumoulin, Janine Dumoulin, Eric Tiffon.

Janine Dumoulin et Jean-Sébastien Brilleaud démissionnent et se présentent à nouveau, ainsi que Seán Ó Riain.

Les trois candidats sont élus à l'unanimité.

Composition du conseil d'administration :

Jean-Sébastien Brilleaud, Luca Buselli, Elvezio Canonica, Yannick Dumoulin, Janine Dumoulin, Seán Ó Riain, Eric Tiffon.

5. Questions diverses

- Marcel a reçu une commande de livres de Périgueux.
- Yannick : Le livre envoyé pour le dépôt légal est arrivé défectueux. Il a donc fallu en envoyer un autre. Les exemplaires exigés par les ayants-droits ont été envoyés aussi. On peut donc commencer à vendre.

Fixer le coût de l'envoi est compliqué car les livres ne pèsent pas tous le même poids : certains dépassent 500g. Il ne devrait pas y avoir de problème pour quelques grammes si on les met directement à la boîte aux lettres.

Dominiko : On peut aussi utiliser les relais.

Modalités de paiement :

- Chèque à l'adresse de Yannick
- virement
- Hello asso ; on peut mettre le livre en ligne sur la boutique de Hello asso.

• Marcel : Nouvelles du film *Nous n'avons pas peur des ruines*. La version en espéranto est prête, mais ne pourra être projetée qu'une fois les sous-titres dans les autres langues finalisés. Il faudra chercher une salle pour le projeter.

La première présentation officielle aura lieu pendant le Congrès Espagnol.

• Il y a dix ans Les Kompanoj ont présenté un spectacle à l'occasion du Congrès de Lille. Ce spectacle de deux heures a été filmé. Il faudrait trouver une salle pour le projeter.

• Seán donne des nouvelles de Clément. Il a commencé travailler à Arcachon en mars et va pouvoir revenir aux réunions.

• Claudine : Vjera, à Toulouse, suivrait volontiers les cours en visio.

L'assemblée générale ordinaire est clôturée à 12h10.

ESPERANTO-GIRONDE

ASSEMBLEE GENERALE

Maison de quartier Pessac Bourg à PESSAC

le 23 mars 2025 à 10h30

Réunion du bureau à 12h15

Election du bureau

Sont élus :

Président : Elvezio Canonica

Vice-Président : Seán Ó Riain

Trésorier : Yannick Dumoulin

Secrétaire : Janine Dumoulin

Fait à Pessac, le 23 mars 2025

Raportis Janine

KUNVENO

PRINTEMPO DE LA POETOJ

Maison de quartier Pessac Bourg en PESSAC

la 23an de marto 2025 je la 12a 30

Post la Ĝenerala Asembleo okazas normala kutima kunveno.

Marcelo kaj Katya rakontas pri la aranĝo kun La Pangée. La lingvoj estis la franca kaj farsi, ĉar la evento temis pri Irano. Estis trejnado pri irana tamburo, en kiu Katya partoprenis.

Katya parolis pri sia sperto en la franca. Marcelo prezentis Esperanton. La interŝanĝo estis agrabla. Estis okazo havi kontakton kun la vic-urbeŝtrino pri internaciaj rilatoj, kiu ĉeestis. Marcelo revidis ŝin post kelkaj tagoj okaze de evento pri Ukraino. Ŝi konas Esperanton kaj estas interesata. Do estas utile konservi rilatojn kun La Pangée.

La Pangée estas asocio de gejunuloj, kiuj interesiĝas pri interŝanĝoj pri lingvoj. Bedaŭrinde partoprenis tro malmultaj vizitantoj.

Dominiko: La koruso de la Grajneto deziras kanti en Esperanto. La venonta kunveno en la Grajneto okazos la 3an ĵaŭdon de aprilo. Partoprenos La Pangée.

Marcelo preparos specialan numeron de LEGI pri la Printempo de la Poetoj. Pri GEME: Devis okazi kunveno en la hejmo de Marcelo sed ĝi estis prokrastita. Tamen Vincent venis kaj profitis individuan kurson!

Elvezio intencas partopreni en la kongreso de Esperanto-France en Nantes.

Marcelo: Pri la traduko de Jacquou le Croquant: Istvan Ertl konsentas kontroli la tradukon.

Post la manĝo: **Printempo de la Poetoj**

La ĉijara temo estas **Vulkana Poezio**.

Klodin' enkondukas la eventon.

Eriko legas la poemon de Zamenhof: *Mia penso*

Jean-Seb legas la fabelon pri la lupo kaj la ŝafido (traduko de G. Vaillant, en 1906).

Seán legas irlandajn poemojn: *Reveno kaj Kara lingvo duone mia*.

Elvezio legas memverkitajn haikojn.





Marcelo trovis unu kanzonon, en kiu estas la vorto «vulkano» : *Voĉo de gitaro mia*, de Claude Piron, kantata de Olivier Tsaut.

Olivier legas poemon de Julio Baghy: *Al nia lingvo*.

Janine legas poemon senditan de Monique: *Naiva favorpeta letero al politikistoj* (Teksto: Morice Bénin - Traduko: T. kaj B. Faverial)

Klodin' prezentas revigligitan klasikaĵon *Saluton, koro mia*, de Ronsard. La franca

poemo estas kantata de Lord Esperanza. La traduko al Esperanto estas de Serge Sire. La prezento temas pri repo kaj klasika poezio.

Marcelo prezentas la poemon de Baudelaire *Invito al vojaĝo*, tradukitan de Kalocsay, kaj kantatan de Jacques Yvart.

Katya prezentas ukrainan poezion, kaj pli precize la nuntempan poeton Vasyl Stus. Ŝi legas la poemon *Printempa vespero*, kiun ŝi tradukis.

Marcelo prezentas analizon pri soneto en Esperanto, kaj legas la poemon *La dormanto de la valo* de Rimbaud, tradukitan de Kalocsay, kaj la poemon *Matena Roso*, de Kim Min-gi, poeto el Suda Koreio.

(Vd la specialan numeron de LEGI 178, pri la Printempo de la Poetoj.)



Raportis Janine

ESPERANTO-GIRONDE
KUNVENO ĉe Jean-Seb kaj Annie en PESSAC
la 13an de aprilo 2025
je la 10a 45

Komenco: 10:46
Protokolanto: «vic'-sekretario» Luca

Ĉeestantoj: Elvezio, Ĵan-Seb, Eric, Bernardo, Rosa, Dominiko, Luca, Olivero, Seán, Annie

Loko: ĉe Ĵan-Sebo (ĉar Elvezio ne havis la tempon preni la ŝlosilon de la salle du Bourg)

Tagaj temoj

1) La lasta eldono de LEGI estis sendita kaj ricevita de ĉiuj.

La venonta temos pri la ĝenerala asembleo.

2) libro: 5 librojn ni vendis

--> la ISBN ne oficialas -> solvenda problemo

Temas pri "dépôt légal"

Dominiko vendis unu per LeBonCoin kaj ĝiris la monon de sia konto al la asocia konto.

La aĉetinto studas E-on per Duolingo

3) Lingvofesto nuligita

Eble ĝi okazos en oktobro. La kursoj ne plu daŭras pro la blokado. Novaj junuloj volas tamen partopreni, kaj kontaktis Elvezion telefone.

4) Renkontiĝo en Saint-Palais

17a – 18a de majo kun la eŭskaj E-istoj.

Marcel (kun-)organizas tion.

Marie el Saint-Palais verŝajne ankaŭ zorgas pri la tuto.

Ni atendas pli da informoj de Marcel.

5) Kongreso de Eo France en Nantes

6a – 9a de junio

Elvezio kaj Seán iros tien.

Aliaj aferoj

- Morgaŭ estos mortdatreveno de Zamenhof.

- Bernardo rakontis, ke, okaze de okcitana kunveno, oni petis de li fari prezentadon de E-o (verŝajne en septembro aŭ oktobro).

- La pesaka ĥoro kantos la 31an de majo en la salle Bellegrave favore de helpema asocio (Ĵan-Seb sendis varban afiŝon en la WhatsApp grupon je la 11:02).
- Luca rakontis pri sia vojaĝo kaj restado en Germanujo.
- Gramatika punkto: vidi edukado.net ĉar okazis reformo farita de la Akademio (neniu ankoraŭ komprenas ion ajn). Kelkajn ekzemplojn donis Elvezio.
- Dominiko momente tradukas bildo-strion de la portugala en la francan --> propono de interreta «atelier» por traduki ĝin Esperante (pere de 'Framatalk') Tio okazus merkredon vespere anstataŭ la universitata kurso (ebleco).
- Temo de la bild-strio: Akv-industrio, kapitalismo, malsekeco, ktp.
- Reklamo farita de Annie pri 'Episol' kaj 'Epicétou': asociaj kaj malmultekostaj «épiceries» en Pesako
- SAT-kongreso: de la 9a ĝis la 16a aŭgusto. Loko: kastelo Greziljono.
- je la 12:11 sendis Ĵan-Sebo bildon de la ĉeestantoj al la WhatsApp grupo.

Oficiala konkludo de la kunveno: 12:19

Ni manĝu!

Raportis Luca



Scienca Raporto de la Societo de Fromaĝ-Amantoj

***"Studo pri la gustopreferoj de la francoj
en la kunteksto de fromaĝelekto"
aŭ "Kie estas la Bri'?"***



Enkonduko: *Fromaĝ-amanteco kiel la plej alta nivelo de filozofio*

Francio estas lando kun pli da fromaĝoj ol tagoj en la jaro, kaj demandi francon pri sia plej ŝatata fromaĝo estas kiel demandi al filozofo pri la signifo de la vivo: la respondo daŭros plurajn horojn kaj plej verŝajne finiĝos per botelo da vino. Por akceli ĉi tiun procezon, ni decidis iri la sciencon vojon kaj faris esploradon.

Kadre de ampleksa studo de la manĝpreferoj de la francoj, farita de la Societo de Fromaĝ-Amantoj, enketo estis farita por determini kiuj specoj de fromaĝo estas plej popularaj inter la loĝantaro. Tiucele formiĝis specimeno de 15 tute hazarde elektitaj respondantoj (el la klubo Esperanto-Gironde), al kiuj oni petis nomi sian plej ŝatatan fromaĝon.

La analizrezultoj montris signifan diversecon de gustopreferoj. Tamen, la studo ankaŭ malkaŝis neatenditan anomalion, kiu meritas apartan konsideron.

Scienca Esplora Metodiko (honeste! pseŭdo-scienco!)

La studo estis farita per rekta enketmetodo, kiu permesis atestajn kaj honestajn respondojn. Respondintoj sendepende nomis sian plej ŝatatan fromaĝon, sen iuj limigoj pri elekto. La datumoj estis prilaboritaj per normaj statistikaj analizmetodoj, kio permesis al ni identigi la ĉefajn tendencojn.

Kiuj? – 15 hazarde elektitaj respondantoj el la klubo «*Espéranto Gironde*» (Jes, ni komprenas, ke ĉi tiuj estas homoj kun iom... aparta vidpunkto).

Kiel? – Rekta demandado, kun plena respekto al la libereco de fromaĝa elekto. Sen ruzoj, sed per penetra rigardo.

La ĉefa kaj sola demando: "Kio estas via plej ŝatata fromaĝo?"

Prilaborado de datumoj – Normaj statistikaj metodoj: krajono, kajero, Excel-programo, ridado, granda deziro ekscii la veron, kaj kelkaj pecoj de Bri' (kiujn neniu menciis!).



Rezultoj kaj analizo

Post prilaborado de la datumoj, la sekva distribuado de voĉoj estis akirita:

Fromaĝo	Nombro da Voĉoj	Komentoj
Ossau-Iraty	6	La oficiala sukceso de la sezono!
Roquefort	2	Ŝajne, la ŝimo aldonas karismon al ĝi.
Kaprina Fromaĝo	2	Kaprina fromaĝo estas preskaŭ filozofio de vivo.
Emmental	1	Estas kiel Kosmo – multaj truoj kaj malmultaj respondoj.
Gruyère Saint-Tru'	1	Ĉu ĉi tio estas vera fromaĝo aŭ ĉu ni prielpensis ĝin? Sonas karisme: "sankta truo", do... konsekrita de la fromaĝdioj?
Comté	1	Voĉdonite de tiuj, kiuj scias, ke vera fromaĝo devus maturiĝi pli longe ol la plej multaj el niaj decidoj.
Camembert	1	La elekto de liberaj spiritaĵoj, kiuj ne timas odoron.
Saint-Nectaire	1	Kromnomata "la fromaĝo de dioj"... sed voĉdonis nur unu... ĉu Dio?
Brie	0 !	KIO?!

Surbaze de la datumoj akiritaj, pluraj ĉefaj konkludoj povas esti tiritaj:

1. *Ŝafa fromaĝo - la reĝo de fromaĝoj*

La plej multajn voĉojn ricevis Oso Irati, tradicia ŝafa fromaĝo el Pireneoj. Ĝi ricevis 6 voĉojn, kio estas 40% de la tuta nombro de respondoj. Tio indikas tendencon al elektado de fromaĝoj faritaj el ŝafina lakto, kiu povas ŝuldiĝi samgrade al la teksturaj trajtoj kaj al kultura heredo de identigitaj regionaj tradicioj en Francio. Ĉi tio povas malfermi novajn perspektivojn por ilia popularigo.

2. *La francoj estas nacio de fromaĝaj individualistoj*

Neniu el la fromaĝoj de bovino aŭ kapra origino (kun la escepto de Oso Irati) ricevis pli ol du voĉojn. Tio povas signifi, ke la francoj elektas fromaĝon same kiel ili elektas parfumon - individue kaj kun karaktero, kio indikas altan nivelon de gastronomia kulturo.

3. *Kio estas la plej granda surprizo?*

Vera ŝoko! Bri' malaperis!


Neatendita anomalio de la studo estis la kompleta malrespekto por la fromaĝo Bri'. Ĉi tiu fromaĝo estas unu el la plej famaj simboloj de franca gastronomio tra tuta Eŭropo, se ne Mondo, tamen neniu el la respondintoj de la enketo menciis ĝin inter siaj plej ŝatataj specoj.

Profunda analizo (aŭ provo klarigi ĉi tiun kaoson)

Ĉi tio povas esti pro pluraj faktoroj:

1. La klasika efiko "memkompreneble" - respondantoj povus supozi, ke iu alia certe menciis Brion, kaj tial nomis malpli evidentajn versiojn.
 2. Bri' estas "ekster taksado" - en Francio, Bri' estas tiel amata, ke ĝi estas konsiderata ekster konkurenco.
 3. Teorio de la Franca Kuirarta Fiereco - eble Bri' estas tiel konsiderata kiel evidenta elekto, ke ĉiuj decidis diri ion pli ekzotikan, ĉu ne?
 4. La enketo estis farita inter esperantistoj, kaj esperantistoj estas nekutimaj eksterordinaraj homoj!
- La fenomeno de "malaperanta Bri'" postulas plian studon por kompreni la kialojn de ĝia malapero de personaj taksoj de konsumantoj.

Jen diagramo por klareco:



Rezulto

Fromaĝa scienco estas kompleksa, sed vere bongustega. Ŝafa fromaĝo transprenas Francion! Venontfoje, kiam vi estos en la superbazaro, elektu la produktojn, kiuj faras "be-eee". Fromaĝo ĉiam estas kun ni. Sed kie estas Bri'? – jen la demando! La fenomeno de la malapero de Bri' restas unu el la plej grandaj gastronomiaj misteroj de la 21-a jarcento. Ne timu konfesi vian amon al Bri'! Amu kuraĝe, manĝu laŭte, dividu pecojn kun amikoj.

Rekomendoj de la Societo de Fromaĝ-Amantoj

1. Daŭrigi la esplorojn kun pli granda specimeno por konfirmi aŭ refuti la rezultojn.
2. Enmeti la demandon en la enketo: "Ĉu vi amas Brion kaj kial vi ne elektis ĝin?"
3. Programi moveblan aplikaĵon (apon) "Kia Fromaĝo Estas Vi?" por malkaŝi la profundajn fromaĝajn preferojn de la homaro.

Fromaĝaj misteroj, kiuj ankoraŭ estas nesolvitaj:

- ? Kial fromaĝo kun truoj pezas pli ol ĝi ŝajnas?
- ? Ĉu vi povas fidi fromaĝon kiu ne odoras?
- ? Kiu manĝas ĉiun matenon la lastan pecon da fromaĝo, kiun ŝajne neniu estis tuŝinta?

La lasta vorto

Se Bri' ne revenos al supraj rangoj, ĉu la sekvonta io, kio malaperos, estos... krescento (korna bulko)?!?

Fromaĝa detektiva digreso

"Bri' malaperis"

(Alternativa versio de «Gerda Malaperis», Klod Piron)

Bri' malaperis. **Tute strange!** Ĝia loko en la fromaĝprefera rango restis malplena, kiel stomako de studento antaŭ stipendio.

Paniko kaptis la fromaĝan mondon. Kamemberto nerveze ŝvitis en sia krusto. Oso-Irati provis aspekti senkulpa, sed ni sciis, ke ĝi kaŝas ion. Rokforto tremis nerveze, kiel homo, kiu unuafoje flaras Livaron, kaj Sen-Nekter' eĉ paliĝis (kio estas vera miraklo!).

— "**Kie estas Bri'?**" — flustris pecoj da fromaĝo unuj al la aliaj en fridujoj tra tuta Francio.

La plej bonaj detektivoj estis alvokitaj al la kazo. Sankta Komisaro Grujero esplordemandis ĉiujn suspektatojn:

"Kie vi estis hieraŭ nokte, Kamemberto?"

"Mi... mi estis en la bakejo. Ni... ni nur trinkis vinon!"

— Kaj vi, Komto?

"Oso-Erati kaj mi ludis petankon... Mi havas alibion!"

Alibio, ĉu? Vakuaj ekskuzoj! Estis klare al ĉiuj: **Bri' ne malaperas simple!**

Sed kie ĝi estas?

Ĉiuj pruvoj direktis al la sekreta organizaĵo "*Fromaĝa Ombro*". Ĝi kulpe jam kaŝis Mimoreton en 2013. Ĉu nun estas la vico de Bri'?...

Kaj jen la ĉefa indico! La venontan matenon, malplena kesto de Bri' estis trovita sur la loko de la malapero. Ĝia kovrilo estis flankenpuŝita... sed fingrospuro estis klare videbla sur ĝi.


— **Dio mia!** — la esploristoj ekkriis — **Iu manĝis la Brion!**

Komisaro Grujero tenis la skatolon al la lumo. Poste li malrapide turnis sin al siaj helpantoj.

— "**Li revenos...**" flustris li.

Iu en la mallumo ridetis.

La esploro daŭras...



Sugesto por legado:

La baletistino de Kijivo

verko de Stéphanie Perez

traduko de la dorsa kovrilpaĝo:


Krizoj funkcias kiel rivelantoj. Ili montras homojn jen kuraĝajn, jen timemajn, jen fortajn aŭ ne, tiujn, kiuj staras sur la ĝusta flanko de la Historio, kaj la perfidulojn. Neniu destino estas antaŭverkiita.

El Kijovo

Jam ekde la unuaj tagoj de februaro 2022, samkiel la tuta Ukraina popolo, la dancistoj de la baletto de la Nacia Opero de Kijivo estas kaptitaj de la milito. Tiuj, kiuj antaŭe vivis centrite al sia korpo kaj sia arto, malkovras solidarecon, reziston, sed ankaŭ timon kaj morton. Perfektaj korpoj estas mutilitaj, kelkaj amikecoj detruitaj pro perfido. La milito renversas certecojn kaj devigas fari neebajn elektojn. Kiel imagi iam reveni sur scenejon? Ĉu danci ankoraŭ havas sencon fronte al barbareco? Ĉu arto povas esti ilo por rezisti kaj defendi sian identecon?

Rakontante la historion de Svitlana kaj Dmytro, paro de steluloj enamiĝintaj en la vivo kaj sur la scenejo, Stéphanie Perez omaĝas al la vojo de tiuj civiluloj, kiuj ne elektis la militon, sed kiuj malkovris sin patriotoj, pretaj al ĉiuj oferoj por savi sian nacion. Tiajn virojn kaj virinojn la aŭtoro renkontis dum siaj du jaroj da raportado sur ukraina tero.

Post *La Gardisto de Teherano*, Stéphanie Perez konfirmas sian talenton kiel tutmonda verkisto per *La Baletistino de Kijivo*, alirante la rus-ukrainan konflikton tra la prismo de arto kaj danco.



OMAĜE AL NIA AMIKO FERNANDO

Jen fotoj kaj la teksto, kiu estis legita en la preĝejo.
Estas la teksto de lia nevino, kiu loĝas en Luksemburgio kaj parolas iomete la francan.

Dominiko

« Mes condoléances..

J'ai pas les mots..tio (**tonton**) a toujours était très aimé par nous tous. je vous envoie beaucoup de force ♥

Mon français est pas le meilleur..mais

Tio Nando (**Tonton Nando, diminutif de Fernando**) a toujours été pour moi le meilleur exemple d'un père, d'un oncle, frère à ma maman.

J'aime comment il me faisait rire, son sourire « maroto »(**coquin**).

J'aime comment il voulait toujours un « vai um cafézinho ? » (**un p'tit café**) et se frottait les mains en le disant.

J'aime comment il voulait toujours savoir de moi et qu'il me demandait comment j'étais au petit déjeuner quand il dormait chez nous à Fão (**ville du Nord**).

J'aime comment il voulait toujours voir la mer et disait « vamos até o Ofir » (**plage à coté de Fão**), car il aimait l'odeur de la mer.

J'aime comment il touchait toujours son oreille et disait « esta uma delícia/esta porra esta boa » (**c'est délicieux, cette chose est bonne**) quand il aimait le manger.

J'aime comment il m'a toujours aidée à moi et Junior à réparer nos bêtises quand nous étions petits, il nous a aidés avec de la "supercola" (**super colle**) à coller les statues qu'on avait cassées et à rien dire à ma mère.

J'aime comment il parlait toujours de Giovan et Gianni, et il disait que « estão a ficar crescidos » (**ils grandissent**)

J'aime comment il appelait ma mère de « morena » (**brune**) le matin et qu'il allait toujours au jardin voir le temps pour savoir s'il allait jusqu'à la mer ou pas ce jour là.

J'aime comment on s'écrivait en Esperanto car il voulait que je l'apprenne car j'avais appris des langues à la fac.

J'aime comment il était avec tia (**tata**) Ana et comment ils s'embêtaient des fois comme des « vieux », et comment il l'aimait.

J'aime tio Nando beaucoup et il signifie beaucoup pour nous tous.

Je vais toujours garder les bonnes mémoires de lui et surtout toutes les leçons qu'il m'a apprises, il est incroyable et il va toujours être présent dans mon cœur.»



Je connaissais Fernando depuis environs 30 ans, puisque nous avions fait des réunions chez lui avec sa femme, Ana Maria, et je discutais avec lui.

Son père était un châtelain qui habitait un "manoir" à Viana de Castelo, tout à fait au nord du Portugal. Il rencontra une très belle roturière et l'épousa en seconde noce.

Le manoir était en mauvais état et ils eurent l'occasion d'aller vivre à Esposende (20 à 30 km plus au sud, à 20km de chez mes parents) où naquit Fernando en 1956.

Fernando a fait des études d'électricien, niveau 3^e. Il aimait la nature, pêcher, chasser... À ses 18 ans, son père lui propose de rejoindre un oncle à côté de Paris qui travaillait dans une pépinière pour qu'il gagne beaucoup d'argent, fasse construire une belle maison au Portugal et y aille en vacances en grande et belle voiture, même s'il ne l'utilise que pour les vacances et utilise le reste de l'année une mobylette.

Il se retrouve donc chez son oncle, boulot, dodo où il s'ennuyait. Un ami lui propose de travailler dans le bâtiment, ce qu'il accepte. Puis, on lui propose d'aller à Bordeaux, ce qu'il accepte également. Il logeait rue la Fontaine, quartier portugais, dans une chambre d'un hôtel restaurant. Ana était venue à Bordeaux pour faire les vendanges pour ensuite partir visiter Londres. Elle travaillait dans ce restaurant dans lequel elle rencontra Fernando et ils ne se quittèrent plus.



J'appelais de temps en temps Ana pendant le premier confinement lorsque j'apprenais avec Duolingo l'espéranto à partir du portugais du Brésil, pour lui demander des explications sur le portugais du Brésil. Ana m'avait dit qu'elle comptait aussi apprendre l'espéranto. Je suis passé la voir un jour et j'ai passé l'après-midi avec Fernando puisqu'il l'avait appris. J'ai été surpris.

Je le voyais plus souvent depuis, nous avons fait un BBQ chez moi, on était allé au hacklab de Bordeaux... mais sans trop le connaître puisqu'il était très discret.

Son travail consistait à faire des enduits pour les maisons. Il ne parlait pas de son travail, même chez lui, car au travail, ils ne

parlaient que de sexe, voiture, argent...

Il avait eu plusieurs passions : brocante, peinture, faune, flore... mais n'a jamais été aussi passionné comme pour l'espéranto.

Il y a deux ans, il était allé au Portugal pour les funérailles de sa mère.

Dominiko

Jen kelkaj bildoj de la pentraĵoj de Fernando.

Elvezio



Honore al karmemora **Isabelle Jacob**,
tro frue forpasinta la 15an de januaro 2025

La Jakoba senecio

Senecio jacobaea
sénéçon jacobée ou herbe de Saint-Jacques
asteracoj



90-100cm
jul-sep - dujara

Jakoba senecio

Ekzistas multaj seneciaj specioj.
Tiu ĉi ankaŭ nomata *Jakoba herbo* entenas kancerigajn substancojn. Ĝia kromnomo eble devenas de la festo al Sankta Jakobo okazanta la 25an de julio periodo de ĝia ekfloro. Blankaj plumtufoj facile portataj de la vento foren dissemas ĝiajn fruktojn.



1

"La jakoba senecio, jen rezistanto!

La Jakoba senecio, aŭ *sénéçon de Jacob*, estas planto, kies intense flavaj kapituloj, situas pinte de disbranĉigitaj tigetoj portataj de ĉefa fortika tigo bele rekta. Ili allogas rigardon. Iuj raŭpoj de noktaj papilioj frandas iliajn foliojn. Ĝi pli frue listiĝis en la farmakopeo pro diversaj el siaj medicinaj ecoj. Kaj tie ĝi plu troviĝas tamen hodiaŭ kun gravaj atentigoj.

Ĝi ekzemple teruras la farmistojn pro ĝiaj substancoj toksaj por la bovoj kaj ĉevaloj. Ĉirkaŭ la ĉevaloj ĝi estas sisteme elradikigita antaŭ florado, kvazaŭ ĝi estus damne sorĉa.

Ni nuntempe scias multon pri la rilatoj inter bestoj kaj plantoj. Seriozaj studoj antaŭ nelonge atestis, ke simioj iel komplekse uzadas plantojn

kiel kuracilojn. Ili kapablas selekti taŭgajn plantojn, por kuraci tiun aŭ ĉi tiun simptonon. Tiujn sciojn instruas gepatroj al siaj idoj kadre de tiel tute taŭge nomata besta kulturo. Eblas supozi, ke tiuj informoj baziĝas sur misoportunaj tragikaj spertoj de venenigo ĉe samspecianoj de antaŭaj generacioj.

Konstateblas, ke ĉevaloj ankoraŭ ne ricevis tiun informon rilate senecion. Eble ĉar, pro homa influo, ili de nelonge apudas plantojn, kiujn ili pli frue ne renkontis...

Malamikoj de la sovaĝaj plantoj estas la herbicidoj grandkvante ŝprucitaj sur la kultivitajn grundojn. Post la dua mondmilito, kontraŭ minacoj de malsatego pro rapidega kresko de la homaro, laboratorioj esploroj eltrovis kemiaĵojn, kiuj disvolvis la "verdan revolucion" per uzado de cerealaj specioj kun alta produktokvanto. Tiel eblis eviti vastan nutromankon tiel timitan. Sed la rebato de tiu "verda revolucio" aperis, kiam oni malkovris la nocegajn konsekvencojn, kiujn ĝi generis por longa tempo. Krom la endanĝerigaj efikoj de tiuj kemiaĵoj kontraŭ la homa sano, ankaŭ notindas la drama reduktiĝo de la nombro de sovaĝaj floroj, kaj konsekvence drasta malpliigo da polenantaj insektoj kaj papilioj. Grava danĝero por la biodiverseco!

Forpelitaj el la vastaj kultivitaj surfacoj, la sovaĝaj floroj rifuĝis en fosaĵoj, sur talusoj kaj ĉe vojrandoj, kie ili pene provas plu kreski spite al traktadoj de zorgantaj fifakuloj.

Tamen naturo ne lasas sin ĉiam mistrakti sen reagi. Tiel eblis konstati rezistadon al herbicidoj. Malpli ol du jardekojn post la komenco de la "verda revolucio", senecioj estis inter la unuaj plantoj, kiuj reage venkis kontraŭ la masive uzita herbicido *atrazino*. Sufiĉis kelkaj individuoj kun genetika potenco reziste adekvata, por ke dank' al iliaj semoj ĉiuj posteuloj de tiuj rezistintoj estu, generacion post generacio, rezistaj al la sama plu elverŝita herbicido. La genetika biodiverseco estas certigo por la elvivado de atakitaj specioj."

El la libro J'ai vu une fleur sauvage (Mi vidis sovaĝan floron)
de Hubert Reeves - *eldonejo Seuil* 2017 p.160-163.

La holosta stelario

Stellaria holostea
stellaire holostée
karlofilacoj



15-30cm
apr-maj - plujara

Holosta stelario

Ĝiaj rigidaj folioj ofte malantaŭen kurbigantaj apogas sin kontraŭ apudaj plantoj, por ebligi pli altan disvolviĝon.

Tre ŝatata pro frua florado, ĝin oni kultivas en multaj ĝardenoj.



"La holosta stelario, jen enigma nomo!

Post la belegaj florepizodoj tuj komence de printempo, kiam sinsekvis la arbaraj anemonoj, vinkoj, fikarioj kaj primoloj alvenas tempo por la holosta stelario.

Iun majan matenon, jen plezuro ekvidi ĝin sternanta verdan kaj blankan tapiŝojn borde de vojoj, heĝoj kaj riveroj, kaj rande de arbaroj. Ĝi ŝatas malsekajn kaj nevarmajn grundojn. Ĝi estas ordinara en nia regiono.

Tiu stelario viciĝas inter tiuj plantoj, kiuj dense floras kaj kovras vastajn surfacojn dum relative mallongaj periodoj. Ĝiaj intense blankaj petaloj verdece rebriletas. La stelaj floroj montras kvin petalojn fenditajn laŭ la longo ĝis la duono. Tio ŝajne multobligas ilian nombron. Centre de la floro troviĝas dek leĝeraj flugemaj stamenoj entenantaj orkoloran polenon kaj ĉirkaŭantaj iun bulon, kiu ricevos la polenon. Ĝiaj tigoj estas kvarangulaj.

Alta je dudek ĝis tridek centimetroj tiu gracia stelario malforte balanciĝas pro vento.

Ĝia nomo ne praviĝas ĉe la unua ekrigardo: la koroloj de la stelarioj similas blankajn stelojn portitajn de kalikoj prezentantaj pli malgrandajn verdajn stelojn. Sed la adjektivo 'holosta' estas ligita al grekdevenaj vortoj. La unua *holos* signifas la tuton, kaj la dua *ostea*, ostoj, daŭre konfuzas min. Ĉu do necesas vidi en ĉiu tigo, ja rigida, sinsekvon de ostoj inter la nodoj, kie ingiĝas la folioj? Kvankam mi provadis, mi ne sukcesis vidi la rilatan similecon.

Stelario estas manĝebla. Tamen pli bone pluku ĝiajn novajn foliojn, pli molaj, eĉ se la pli malnovaj tamen ne malmolas kiel ostoj...

Alia stelario estas unu el la plantoj tradicie enmitita en la rizon dum la Festo de la sept herboj, japana kutimo por alporti feliĉon al la invititoj. Temas pri la blanka anagalo, kromnomita anagalo de la birdoj aŭ *Morgelino*. Ĝiaj blankaj floroj malebligas la konfuzon kun la ruĝa anagalo. Ĝin tre ŝatas abeloj kaj aliaj polenigaj insektoj.

El la libro J'ai vu une fleur sauvage (Mi vidis sovaĝan floron)
de Hubert Reeves - eldonejo Seuil 2017 p.167-169.

Anagallis arvensis
Mouron rouge
primolacoj



5-30cm
jun-okt - unujara

Ruĝa anagalo

Ruĝan anagalon oni uzis por kuraci psikajn malsanojn. Ĝiaj floroj malfermiĝas je la 9a horo kaj refermiĝas maksimume je la 15a. Ili ankaŭ fermiĝas en kazo de kovrita ĉielo anoncanta baldaŭan pluvon. La planto bezonas lumon kaj kapablas kovri larĝajn spacojn.



Ni funebras

Tuj post la entombigo de Fernando, jen denova grava perdo por nia movado: **Isabelle Jacob**, sepdek jara abrupte forpasis forpafita de kancero. Mi klare memoras la tagon de nia konatiĝo. Ĝi okazis en Ambüazo, la 31an de marto 1991. Por tiu vespero la SAT-Amikara kongreso programigis muzikgrupon nove kantantan en esperanto: Kajto. Sorĉite de la spektaklo grupeto scivolis pri la artistoj kaj petis de ili daŭrigi la babiladon. Tiel en dometo de la VVF, kie ni tranoktis, noktumis kelkaj personoj kaj ekligiĝis novaj geamikoj. Inter tiuj Ankie, Nanne, Marian, Marita sed ankaŭ Isabelle kaj Pierre, kiuj antaŭ nelonge eklernis esperanton. Mi tute ne povis tiam imagi pri la forteco de la amikeco kreita dum tiu nokto.



Pierre Cognard > Isabelle Jacob > Floreal Martorell > Cécile Descubes

La postan jaron Isabelle kaj Pierre partoprenis la kongreson, kiun Esperanto-Gironde organizis en Artigues-près-Bordeaux.

1992- Fotis Henri Masson

Botanikistino, mikologo (fungologo), ŝi gvidis kaj komentis promenadojn tra kamparo kaj arbaro renkonte al sovaĝaj floroj kaj fungoj. Pri tio ŝi verkis plurajn pedagogiajn librojn, ĉiuj tre bele ilustritaj: *Les arbres*, *Les fleurs des bois*, *Allons aux champignons*, *Recherchons les graines*, *Les baies et autres petits fruits charnus*, *Les feuillus de nos campagnes*, *Les champignons du marché*, *Les conifères et autres sempervirents*. Dum multaj jaroj ŝi aktivis kadre de la Natur-Centro *La Loutre* apud Limoĝo. Klasojn ŝi animis kaj malkovrigis la plantojn al infanoj sed ankaŭ al natur-amantoj. Tie ŝi ankaŭ plurfoje venigis esperantistojn.





Ilustraĵoj de Roland Sabatier

Motoro de la loka grupo, ŝi redaktis la bultenon *Babilemo sen Limoj*.

Inter la multnombraj okazoj por plene kunvivi nian komploton, ne nur dum SAT-eventoj, mi citu nur la plej elstarajn:

- En aprilo 1997 Isabelle organizis kun sia grupo la SAT-Amikaran kongreson en Limoĝo kaj invitis nian kantan kaj

teatran trupon. Tiam La Kompanoj prezentis sian plej bonan version de sia kreaĵo "La Pariza Komuno, kantante!". Dankon Isabelle pro tiu fido al ni.

- En junio 2014 Isabelle grupigis geesperantistojn por vojaĝo tra Rumanio. Gviditaj de Rodica Todor, ni pasigis dek du eksterordinarajn tagojn.

- En la Muelejo de Piot en Cheniers (23) Isabelle starigis semajnfinaĵajn esperanto-staĝojn kaj ni partoprenis en la jaroj 2019 kaj 2024... lastan septembron. Tiam ŝi entuziasme raportis pri la UK en Tanzanio kaj la vigleco de la afrika movado, pri ŝiaj esperoj por Esperanto dank' al homoj sur tiu kontinento.

Laste ni vidis ŝin en Rochecouard post la oficiala omaĝo al Aristides de Sousa Mendes. La festivalo *Foutez nous la paix!* proponis al ni portugalan vesperon. Ni kunĝuis tiun vespermanĝon kaj spektaklon. Kiel kutime ni tranoktis en 'Pomarbo', la hejmo de Isabelle kaj Pierre. Forlasante ilin la morgaŭon neniu tiam povis imagi la tragikan finon.

Isabelle ne suferis dolorojn. Tamen fine de novembro pro nekomprenebla lacego ŝi konsultis kuracistojn. Meze de decembro ŝi plene konsciis pri sia baldaŭa morto. Ŝi postulis silenton de siaj proksimuloj kaj strikte intima kremacio. Ŝi forpasis unu monaton poste. Des pli neatendite la novaĵo pri la forpaso de Isabelle konsternis kaj profunde kortuŝis ŝiajn multnombrajn geamikojn.

Marcelo, perdinte aŭtentan samideaninon.



Lidja vojaĝis de Bordoza al Seulo

Reage al la atenco kontraŭ *Charlie* mi iom studis la itineron de karikaturaj tra la historio. Mi ankaŭ esploris la esperantistajn gazetojn kaj revuojn, kiujn nia asocio tiam malferme disponigis en la Kultur-Centro *Palmer* en Cenon.

Sekve mi kompilis dokumentojn kaj redaktis sufiĉe longan artikolon, kiun SAT publikigis en la Sennacieca Revuo (nro de decembro 2019) kaj Esperanto-Gironde eldonis broŝureton sub titolo ***Esprimlibero per presdesegnoj***.

En ĝia lasta parto mi skribis pri karikaturaj en la esperanto-movado. Mi raportis pri mia esplorado por trovi karikaturajn de Zamenhof kaj surpriziĝis, ĉar se ne mankis jam de la jaro 1911 karikaturaj de la tiamaj movadaj famuloj: *Archdeacon*, *Boirac*, *Bourlet*, *Cart*, *Hodler*, *Michaux*, *Privat*, ktp. Tute ne aperis *Zamenhof*. La plej malnovan mi trovis en la satira revuo *La Pirato*, redaktita de Rajmundo Schwartz (Ŝvarc) inter 1933 kaj 1935. Ĝin desegnis Rajmundo Laval.

En la tiamaj jaroj la Groupe de Bordeaux, sub impulso de ĝia kasisto Charles Brunet, amiko de Ludoviko, organizis la 31an naciĝan kongreson de Esperanto (1934) kaj tiukaze eldonis bildkarton kun karikaturaj de la organizantoj plus tiun de Lidja Zamenhof, kiu jam venis la antaŭan jaron por gvidi kursojn (20 lecionoj) en la Bordoza ateneo.



Hieraŭ mi ricevis de k-do
KANG Hon-gu,
korespondanto el Seulo,
kelkajn fotojn de la tiea
sidejo de la Korea Esperanto
Asocio.

Kaj inter tiuj, la ĉi apuda
amuzis min. Sur muro tie
pendas kopio de la
karikaturado kreita en
Bordozo antaŭ 90 jaroj!



Mi ne retrovis spuron pri la
desegninto H. Gourbil. Tamen eblas
supozi, ke li forte inspiriĝis de ĉi-
apuda foto de Lidja, dum ŝi
prezentis kurson - per rekta metodo
- en St-Etienne en 1930.

Ĉu ankaŭ vi rimarkas similecon inter
la foto kaj la desegno kaj samopinias
pri la fonto de la karikaturado?

Mi ĝojas, ke tiaj artaĵoj vojaĝadas tra la mondo per Esperanto. Mi ĝojas,
ke esperantistoj kapablas sprite ridi pri si mem. Mi ĝojas, ke ili adoptis la
Ŝvarcan moton: **"Seriozi ne povas, kiu ridi ne scias!"**

Marcelo



Soneto al Lidja Zamenhof

de Charles Brunet - 22an de junio 1933

Ĉe lecion' l' unua, skeptikulo,
Kaptita estas tuj, per via scio...
Ĝi plu ne pensas; restas sen konscio,
Tutpreta kredi, al de Vi, formulo.

Lernado por Ĝi estas ne... regulo
Sed dolĉa kaj plezura sensacio.
L'aplaŭdo fina post « Konversacio »
Vin pruvas, ja, l' esprimon de gratulo.

O, majstrfilino, kiu logas mensojn
Kaj akirigas kleron per amuzo;
Meritas Vi, de ĉiuj dankajn pensojn.

De l' lingvoj – lernigante – kvintesencon
Konkordon Vi liveras, sen konfuzo!
Ĉar donas Vi al Hom' la vortpotencon!

A la première leçon, un sceptique
Est de suite captivé par votre savoir...
Il ne pense plus ; reste sans conscience
Entièrement prêt à croire, à une formule émanant de Vous.

L'apprentissage pour lui n'est pas... une règle
Mais une sensation douce et plaisante.
L'applaudissement final après la « Conversation »
Vous prouve, assurément, l'expression de gratitude.

Ô, fille du Maître, qui attire les esprits
Et fait acquérir la culture par l'amusement ;
Vous méritez de tous des pensées de remerciements.

Instruisant la quintessence (le meilleur) des langues
Vous livrez la concorde (l'harmonie) sans confusion !
Car vous donnez à l'Homme la puissance des mots! (du verbe, de la langue)

ESTRARO
de
«ESPÉRANTO-GIRONDE»

* * * * *

Adreso ĉe la prezidanto

* * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Université de Bordeaux Montaigne
UFR Langues,
Domaine Universitaire, Esplanade des Antilles,
33600 Pessac

Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Vic-Prezidanto: **Seán Ó RIAIN**

98 route du Mouquet
40160 Parentis-en-Born

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**

2, chemin des Nauves
Chardes 17130 MONTENDRE
Tel: 05 46 49 07 46 / janinedum@neuf.fr

Kasisto: **Yannick DUMOULIN**

2, chemin des Nauves
Chardes 17130 MONTENDRE
Tel: 06 84 11 26 95 / yannickdum@aol.com

* * * * *

**Kontribuojn por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al esperanto.gironde@free.fr**



Venontaj kunvenoj en Maison de quartier Pessac Bourg en PESSAC, je la 10a30 :

- la 11an de majo
- la 15an de junio

